

**Otto Prytz**

*(emeritiĝinta el / retired from)*

*Universitetet i Oslo, Norvegio / Norway*

## Ĉu Esperanto, priskribita laŭ siaj propraj premisoj, estas seksisma lingvo?

**Resumo:** La artikolo komenciĝas per ekzemploj pri la ne-universaleco de gramatikaj kategorioj, ne-universaleco ofte kaŝita pro tio, ke la gramatiko de prestiĝa lingvo, ekzemple la latina en Eŭropo, servis kiel modelo por priskribi aliajn lingvojn. Lingva sistemo devus esti priskribata laŭ siaj propraj premisoj. Opozicioj estas grava trajto de lingvaj subsistemoj. En la opozicio de adjektivoj signifantaj dimension, la markita membro, la malgrand-dimensia, referencas al unu "poluso" de la gamo, dum la nemarkita membro povas referenci al la alia poluso aŭ al la tuta kampo de la opozicio. Aliaj opozicioj en Esperanto estas tiuj de nombro, de kazo kaj de ulo / aĵo. Tiu lasta, en la triapersonaj pronomoj, ekzistas nur en singularo, kaj ĝia markita membro ŝajnas esti "ulo", kiu siavice enhavas opozicion de sekso, kies markita membro estas "insekso". Tio signifas, ke la nemarkita membro, "li", "frato", "filo" ktp., povas referenci ĉu al la virseksa poluso, ĉu al la tuta kampo de seksa opozicio. Konklude, seksismo estas sinteno, ne eco de lingvo: lingvo kun trajtoj eble spegulantaj sintenojn de iamaj parolantoj, estas perfekte uzebla ankaŭ de kontraŭuloj de seksa subpremado.

**Ŝlosilvortoj:** Esperanto; Gramatikaj kategorioj; Lingvaj opozicioj; Poluseco / nepoluseco; Sekso.

### 1 Ĝenerala enkonduko

Multaj homoj supozas, ke gramatiko estas io universala, kaj ke gramatikaj kategorioj estas absolutaj. Oni emis preni la gramatikan sistemon de iu prestiĝa lingvo kiel modelon de tia universala gramatiko. La pra-fonto de la gramatikaj terminoj nun uzataj estas la antikva greka lingvo. La prestiĝo, kiun akiris la latina lingvo pro la potenco de la Romia regno, kaŭzis, ke oni tradukis la grekajn terminojn en la latinan, kaj modifis ilin laŭ ties gramatika strukturo. Dum jarcentoj oni en Eŭropo konsideris la latinan gramatikon la "ĝusta" kaj, sekve, oni priskribis la gramatikojn de aliaj lingvoj laŭ modelo latina.

En aliaj regionoj aliaj lingvoj servis kiel modeloj; tiel, sur la hinda subkontinento la sanskrita estis modela, kaj en la islama mondo la klasika

araba havis similan rolon. Ne estas mia celo ĉi tie diskuti, ĉu vere ekzistas universala gramatiko aŭ ne. Kio tamen estas eksterduba, estas, ke la kategorioj uzataj por konsistigi gramatikan sistemon, multe varias de lingvo al lingvo. Jen kelkaj ekzemploj:

La klasifiko de vortoj laŭ vortklasoj estas malsama en malsamaj lingvoj, kaj eĉ en unu sama lingvo povas ekzisti malsamaj analizoj.

Ne estas universala vero, ke verboj esprimu la tempon, en kiu okazas ago. En multaj lingvoj la aspekto de la ago estas pli grava.

Ne estas universala vero, ke verboj havu voĉojn aktivan kaj pasivan. En Esperanto la participoj estas eksplicite aktivaj aŭ pasivaj, sed en multaj aliaj lingvoj ili povas esprimi ambaŭ sencojn. En la greka ekzistas voĉo mediala, kiu estas nek aktiva, nek pasiva.

Ne estas universala vero, ke substantivo havu nur du nombrojn. En iuj lingvoj ili nombron tute ne havas; en aliaj la nombra kategorio ampleksas ne nur singularon kaj pluralon, sed ankaŭ dualon kaj eble eĉ ankoraŭ aliajn membrojn.

Ne estas universala vero, ke adjektivo havu tri gradojn: pozitivon, komparativon, kaj superlativon. En la hispana, ekzemple, la diferencon inter tio, kio en Esperanto estas komparativo kaj superlativo, oni esprimas per ne-ĉeesto kaj ĉeesto de la difina artikolo; alivorte oni inkluzivas ĝin en la kategorion de (ne)difiniteco (Alarcos Llorach 1994). Pri la hispana oni eĉ povas dubi, ĉu la kategorio de grado entute apartenas al la adjektivoj (kaj adverboj): la esprimiloj de gradoj egale povas modifi substantivojn kaj verbojn.

Ke (ne)difiniteco ne estas universale valida gramatika kategorio, pri tio ne necesas argumenti: jam la unua paragrafo de la *Fundamenta Gramatiko* (en Zamenhof 1905) atentigas pri la malfacileco regi la uzon de la artikolo en Esperanto. Tion, kion oni en unuj lingvoj esprimas per difiniteco aŭ nedifiniteco, oni en aliaj lingvoj esprimas per “tuteco” kaj “parteco”, aŭ oni iel rilatigas ĝin al sintaksaj funkcioj.

Ne estas universala vero, ke tiu, kiu ricevas “utilon aŭ malutilon” de iu ago, ekzemple tiu, al kiu oni ion donas, estu “nerekta komplemento” aŭ “nerekta objekto”. En la finna lingvo por tiu rolo oni uzas kazon, kiu indikas direkton kaj tiel konsistigas parton de la sistemo de lokaj kazoj. Ankaŭ en Esperanto la prepozicio *al* por tiu rolo sugestas, ke ni konsideru ĝin kiel komplementon (adjekton) de direkto.

Pro ĉiuj tiuj diferencoj inter la lingvoj, la gramatika aliro al iu lingvo devas konsisti en priskribo laŭ la premisoj de tiu lingvo mem.

En ĉi tiu esplora noto, mi pritraktas unu fenomenon relative gravan en lingvoj ĝenerale, nome *lingvajn opoziciojn*. Mi studas kelkajn opoziciojn en Esperanto, kaj iom post iom alvenas al temo vekinta polemikon: ĉu Esperanto estas seksisma lingvo.

## 2 Lingvaj opozicioj

### 2.1 Enkonduko

Ĉiu elemento de lingva sistemo - aŭ subsistemo - iel estas en opozicio al ĉiuj aliaj elementoj de la sistemo. La sonsistemo de Esperanto estas difinata ĝuste per la opozicioj, per kiuj unu sono rilatas al la aliaj sonoj de la sistemo. Sur la morfologia (vortforma) kampo ni povas paroli pri opozicio inter singularo kaj pluralo en la substantivoj kaj adjektivoj, pri opozicio inter unua, dua, kaj tria personoj en kelkaj pronomoj, ktp. Opozicioj gravas ankaŭ por la atribuo de signifoj al la lingvaj esprimiloj.

Imageblas pluraj tipoj de opozicio. Trubetskoy (1939), la fondinto de la fonologio, klasis la opoziciojn laŭ pluraj interkruciĝantaj kriterioj. Chomsky (1957), la iniciatinto de la genera gramatiko, kreis modelon, laŭ kiu ĉiu opozicio estu dis-erigebla en serion da opozicioj duumaj (binaraj), do opozicioj havantaj nur du membrojn (Chomsky kaj Halle 1968). Ĉi tie mi ne detaligas la aferon, sed koncentriĝas pri unu tipo de opozicio, kiu estas aparte grava por kompreni la funkciadon de kiu ajn lingvo.

### 2.2 Markita kaj ne-markita membroj

Por ke du (aŭ pluraj) elementoj estu en opozicio, ili devas - kiom ajn paradoksa tio unuavide povas ŝajni - havi ion komunan: ili devas aparteni al la sama sfero aŭ - se oni preferas - al la sama sistemo. Ni facile perceptas la opozicion inter *granda* kaj *malgranda*, ĉar ambaŭ estas adjektivoj, kiuj indikas dimension, do apartenas al unu sama signifokampo. Sed ni ne perceptas opozicion inter *granda* kaj *bruna*, kvankam ankaŭ ambaŭ tiuj vortoj estas adjektivoj; kaj multe malpli ni perceptas opozicion inter la adjektivo *granda* kaj vortoj, kiuj ne estas adjektivoj, kiel la adverbo *tie* aŭ la verbo *veni*.

Kun tia komuna fono unuflanke imageblas opozicio, kies membroj havas egalan rangon. En Esperanto tio eble okazas inter *iri* kaj *veni*. Tamen, aliflanke, imageblas opozicio, en kiu unu el la membroj estas pli ĝenerala ol la alia. Ekzemplon de tia opozicio konsistigas la adjektivoj indikantaj dimension, traktitaj de Manfred Bierwisch (1989), ilustritaj ĉi tie per la adjektivoj de la tri geometriaj dimensioj:

#### Dimensio granda

*longa*

*larĝa*

*alta*

#### Dimensio malgranda

*mallonga*

*mallarĝa*

*malalta*

La grand-dimensiaj adjektivoj estas konsiderataj kiel pli ĝeneralaj ol la malgrand-dimensiaj; ja el la unuaj estas derivitaj la ĝeneralaj substantivoj: “la volumeno de korpo estas la *longo* multiplikita per la *larĝo* multiplikita per la *alto*” (ne “la mallongo per la mallarĝo per la malalto”). Tial Bierwisch karakterizas la malgrand-dimensiajn adjektivojn per +*Polarität* (“+poluseco”, markita) kaj la grand-dimensiajn per -*Polarität* (“-poluseco”, nemarkita). Se ni ne konas la dimensiojn de objekto kaj volas demandi pri ili, ni uzas la grand-dimensiajn adjektivojn: “Kiom *longa* estas la tablo?” Nur se ni scias, ke la objekto situas en la malgrand-dimensia parto de la gamo, ni povas permesi al ni duonŝerce demandi, kiel ekzemple: “Kiom *mallonga* estas la tablo?”, “Kiom *mallarĝa* estas la vojeto?”, “Kiom *malprofunda* estas la akvo?”, “Kiom *malvarma* estas la aero?”, “Kiom *maldika* estas la ulo?” En Esperanto la prefikso *mal-* preskaŭ ĉiam donas al la adjektivo malgrand-dimensian signifon. Esceptoj estas *maljuna* kaj *malnova*, kiuj indikas dimension grandan en la opozicio kun *juna* kaj *nova*.

Kiam unu membro de opozicio estas uzata ne sole por indiki unu el la “polusoj”, sed ankaŭ por nur ĝenerale indiki la sferon de la opozicio, oni diras, ke tiu membro estas *ne-markita*. La alia membro, kiu estas uzata nur por indiki unu el la polusoj, estas la membro *markita* (kp. Trubetzkoy 1939, 69). Ofte, sed ne nepre, la tiusence markita membro estas markita ankaŭ morfologie. Ni nun rigardu kelkajn opoziciojn en Esperanto.

## 2.3 Nombro

Tiu opozicio havas du membrojn: singularo kaj pluralo. Morfologie la pluralo estas markita ĉe substantivoj kaj adjektivoj per *-j*, dum la singularo ne estas markita.

En la reala mondo nur ĉe nombrebilaĵoj havas sencon distingi inter unu kaj pluraj; nenombrebilaĵoj ne apartenas al la signifokampo de nombrado. Tamen, uzante kiun ajn substantivon aŭ adjektivon, ni vole-nevole devas elekti formon apartenantan al la opozicio de nombroj. Ĉe nenombrebilaĵoj la plej oportuna strategio normale estas uzi la formon nemarkitan - kaj sekve malpli ĝenan por ĝusta interpretado de la mesaĝo. Tiu formo estas la singularo: “En Saharo estas *multa sablo*.” Ni tamen povas permesi al ni uzi la markitan membron - la pluralon - por esprimi, ke la kvanto de la nenombrebilaĵo estas tiom granda, ke ĝi meritas esti prezentata kiel multenombraĵo: *la grandaj sabloj de Saharo*.

En substantivoj kunmetitaj de du (aŭ pluraj) substantivaj radikoj, oni nombre markas nur la lastan eron de la kunmetaĵo, dirante *infanĝardeno* (ne “infanoj-ĝardeno”), kvankam klare temas pri ĝardeno por infanoj,

kiel indikas la germana vorto *Kindergarten*, de kiu la Esperanta vorto estas paŭsita.

Ankaŭ ĉe nombrebloj eblas uzi la nemarkitan singularon por referenci al pluraj objektoj, se la nombro ne gravas. Aŭto-posedanto povas diri “*Mi havas aŭton*”, eĉ se li havas plurajn (Alonso 1951; Alarcos Llorach 1970).

## 2.4 Kazoj

La Esperanta kazo-sistemo havas nur du membrojn: nominativon kaj akuzativon. Morfologie la akuzativo estas markita per *-n*, dum la nominativo ne estas markita. Ankaŭ signife la akuzativo estas markita, kvankam ne estas facile determini, kiu signifa trajto estas komuna al ĉiuj ĝiaj uzoj. Eble *direkto* estas esenca parto de ĝia signifo: objekto estas tio, al kio “*direktiĝas*” la verba ago, kaj post prepozicio kaj ĉe lokaj adverboj la akuzativo montras la direkton de movo.<sup>1</sup> Kiam ne estas bezonata tiu markilo, oni uzas la nemarkitan nominativon - eĉ en kunteksto de direkto, kiel ĉe *al* kaj *ĝis*.

## 2.5 Uloj kaj aĵoj

Nur ĉe la singularaj triapersonaj pronomoj estas forma distingo inter ulo kaj aĵo: *li* kaj *ŝi* indikas ulon, dum *ĝi* indikas aĵon. La plurala *ili* estas indiferenta pri tiu opozicio. La unuapersonaj pronomoj montras al la parolanto, kaj la duapersonaj al la alparolato. Ĉar kaj parolantoj kaj alparolatoj normale estas personoj, tiuj pronomoj normale montras al uloj, sed ne necesas indiki ulecon kiel specifan eron de ilia signifo (ekzemple, “*Kial vi ne volas malfermiĝi, skatolaĉo?*”).

La klaso de aĵoj estas multe pli vasta ol la klaso de uloj, kiu ampleksas preskaŭ nur homojn. Tial estas nature, ke multaj afiksoj indikas ne-ulojn: *-aĵ-*, *-ec-*, *-ej-*, *-il-*, *-ing-*, kaj *-uj-*. Tamen, karakterizaĵo de Esperanto estas, ke ĝi havas relative multajn afiksojn, kiuj indikas ulojn: *-an-*, *-estr-*, *-id-*, *-in-*, *-ist-*, *-ul-*, *-ĉj-*, *-nj-*, *bo-*, kaj *ge-*. Al tiuj aldoniĝas la substantivaj participoj, kiuj principe indikas personon. La ekzisto de du triapersonaj singularaj pronomoj indikantaj ulon, kaj nur unu indikanta aĵon, estas plia manifestiĝo de tiu tendenco subkategoriigi ulojn pli ol aĵojn.

1 Ĉi tio ne klarigas *ĉiujn* uzojn de akuzativo, ekzemple tiujn de mezuro kaj tempo, do la priskribo bezonas precizigon.

## 2.6 Sekso

La sola seksa specifo en la pronomo sistemo estas la vira *li* kaj la ina *ŝi*. Ĉe la substantivoj la ina sekso estas morfologie markita per la sufikso *-in-*, dum la vira ne estas markita. Se la morfologia markiteco respondas al markiteco signifa - kiel ĉe nombro kaj kazo - la ineksaj esprimiloj uzeblas nur por montri al la ina “poluso” de la opozicio, dum la nemarkitaj esprimoj uzeblas kaj por la virseksa “poluso” kaj por la seks-opozicia signifokampo ĝenerale. Tio klarigas, ke la pronomo *li* estas aplikebla ĉu virsekse, ĉu seksneŭtrale.

La lingvosciencaj terminoj “opozicio” kaj “markita”, inter aliaj, ekestis nur post la morto de Zamenhof, do li ne povis priskribi Esperanton per ili. Tamen, en *Lingvaj Respondoj* 89, 90, 91 kaj 92 (Zamenhof 1962), li prezentas la pronomon ĝi kiel nemarkitan rilate al *li* kaj *ŝi*, kaj *li* kiel nemarkitan rilate al *ŝi*. Alivorte, *aĵo* estas la nemarkita membro de la opozicio *aĵo / ulo*, kaj virsekseco estas la nemarkita membro de la opozicio de *sekso*.

En studaĵo publikigita en *Lingva Kritiko*, Marcos Cramer (2021a, poste plidetiligita en Cramer 2021b) klasifikas la substantivojn indikantajn ulon, en kategoriojn: (1) sekse neŭtralajn, ajnaseksajn, ĉe kiuj ne havas sencon aldoni *-in-* por esprimi inecon (*homo, infano, persono, viktimo*); (2) virseksajn, al kiuj nepre aldoniĝu *-in-* por esprimi inecon (*patro, frato, viro, knabo*); (3) sekse neŭtralajn aŭ virseksajn, al kiuj eblas, sed ne nepras, aldoni *-in-* por esprimi inecon (*amiko, profesoro, redaktoro, -isto, -ano*); (4) ineksajn per si mem (*damo, geĵo, matrono*); (5) virseksajn per si mem (*boko, eŭnuko*).

Mi ne estas ano de rigora subkategoriiĝo: mi taksas, ke la gramatikaj principoj estas tiel ĝeneralaj, ke ne necesu subkategoriiĝado por klarigi ilian aplikadon. Inter la supre menciitaj “kategorioj” mi do principe ne perceptas klarajn limojn, sed ĉiu el ili koncentriĝas en difinita parto de la signifokampo de “sekseco”.

La vortoj el la kategorioj (4) kaj (5) falas ekster la kampo de seksa opozicio, ĉar ili klare situas nur ĉe unu poluso.

La vortojn el la kategorio (2) Marcos Cramer sendube metis en tiun kategorion, ĉar ili situas tiel proksime al la virseksa poluso, ke praktike ne eblas uzi ilin en ĝenerala, ne-markita senco. Tamen, eĉ en la verkaro de Zamenhof oni facile trovas ekzemplojn de sekse nemarkita uzo ankaŭ de tiuj vortoj. Jen kelkaj: “*la nepoj vin benos*” (*La vojo*) (Zamenhof 1929, 587); “*Al la fratoj*” (titolo de poemo, en kiu *fratoj* figuras nemarkite ankaŭ en la teksto) (Zamenhof 1929, 588); “*Kuniĝu la fratoj*” (*Preĝo sub la verda standardo*) (Zamenhof 1929, 590); “*Kristanoj, hebreaĵoj aŭ mahometanoj / ni ĉiuj de Di’ estas filoj*” (Zamenhof 1929, 590). Estas nepenseble, ke Zamenhof per tiuj vortoj celus nur virseksulojn!

La vortoj el la kategorio (3) esprimas ulojn, kies seksa aparteno ne nepre estas indiferenta, do povas sentiĝi bezono marki ineksecon ĉe ili.

Sekve ili kondutas kiel nemarkitaj membroj de opozicio, povante indiki ĉu proksimecon al unu poluso, ĉu ĝeneralecon.

La vortoj el la kategorio (1) indikas ulojn, kiuj havas seksan apartenon, sed la signifo de tiuj vortoj estas tiel ĝenerala, ke la seksa aparteno estas indiferenta. Ili do iel kovras la tutan kampon de seksa opozicio.

### 3 Konkludoj

Per ĉi tiu esplora noto mi volis montri, ke opozicioj inter membroj nemarkita kaj markita(j) estas fenomeno normala en lingvoj. Ili utilas por fari manipuleblan sistemecon el la amorfa mondo, kiu ĉirkaŭas nin. Ĉu la opozicioj establitaj en difinita lingvo estas logikaj - aŭ eĉ etikaj - tio estas eksterlingva afero. Lingvo estas ilaro, kiu konsistas el limigita kvanto da iloj, kiujn ni devas uzi laŭ iliaj ebloj.

Ĉu la strukturo de lingvo povas influi la sintenojn de ĝiaj parolantoj? Kaj ĉu la sintenoj de la parolantoj de difinita lingvo povas determini ties strukturon? Ambaŭ demandojn oni povas respondi per "eble certagrade." Ne estas tute hazarde, kiuj kategorioj kaj opozicioj ekestas en iu lingvo: tio parte dependas de la esprimbezonoj sentataj de ĝiaj parolantoj. Se tiuj bezonoj ŝanĝiĝas tra la tempo, oni emas kontentigi ilin per la iloj provizitaj de la heredita lingvo; sed se la ŝanĝoj de la esprimbezonoj estas tiel drastaj, ke ili vekas senton de neceso ŝanĝi ankaŭ parton de la ilaro, tiam ankaŭ la lingvo ŝanĝiĝas, kvankam multe pli malrapide ol la esprimbezonoj. Se lingvo iam ekhavis seksisman strukturon, kaj ĝiaj parolantoj post iom da tempo sentas sin ĝenataj de tiu strukturo, ili ne forĵetas la lingvon aŭ proponas drastajn ŝanĝojn, sed uzas la ilojn, kiujn ili havas je sia dispono, por laŭeble mildigi la ĝenon. Lingvo kun trajtoj seksismaj, eble spegulantaj iamajn sintenojn de ĝiaj parolantoj, estas perfekte uzebla ankaŭ de kontraŭuloj de seksa subpremado. En la hispana lingvo, ekzemple, la gramatika ingenro estas sekse markita, dum la virgenro estas ne-markita. Sekvo de tio estas, ke unu sama vortformo, *hermanos*, signifas "fratoj" kaj "gefratoj", dum estas aparta vortformo, *hermanas*, por "fratinoj" (kaj same pri multaj aliaj vortoj). Eĉ la pronomo *ni* havas specialan, markitan ingenran formon en la hispana, *nosotras*, uzeblan kun referenco ekskluzive al inoj, dum la virgenra formo *nosotros* uziĝas indiferente pri nur viroj kaj pri ambaŭseksa grupo. Tio tamen ne igis eĉ la plej ardajn adeptojn de seksa egaleco proponi forigon de la du-genra sistemo de la hispana lingvo.

Esperanto jam trapasis la stadion de lingvoprojekto; ĝi estas lingvo kun jam establita strukturo same malfacile ŝanĝebla, kiel la strukturo de genta lingvo. Ni laŭeble konscie uzu tiun ilaron tia, kia ĝi estas. Se sentiĝos sufiĉe forta bezono de modifoj de la ilaro, ili jam aperos en la pleneco de la tempo.

## Bibliografio

- Alarcos Llorach, Emilio. 1978. *Estudios de Gramática Funcional del Español*. Madrid: Gredos.
- Alarcos Llorach, Emilio. 1994. *Gramática de la Lengua Española. Real Academia Española, Colección Nebrija y Bello*. Madrid: Espasa-Calpe.
- Alonso, Amado. 1951. *Estudios Lingüísticos: Temas Españoles*. Madrid: Gredos.
- Bierwisch, Manfred. 1989. “Semantik der Graduierung.” En *Grammatische und konzeptuelle Aspekte von Dimensionsadjektiven*, redaktis Manfred Bierwisch kaj Ewald Lang, 91-286. Berlin: Akademie Verlag.
- Chomsky, Noam. 1957. *Syntactic Structures*. Berlin: Mouton de Gruyter.
- Chomsky, Noam kaj Morris Halle. 1968. *The Sound Pattern of English*. New York: Harper & Row.
- Cramer, Marcos. 2021a. “Seksneŭtralaj parencovortoj: Rezultoj de opinisondo.” *Lingva Kritiko*. Konsultita la 10-an de Februaro 2023. <https://lingvakritiko.com/author/marcos/>.
- Cramer, Marcos. 2021b. “Empirical study on the use of gender-neutral pronouns in Esperanto.” En *The Intercultural Role of Esperanto*, redaktis Ilona Koutny, Ida Stria kaj Michael Farris, 201-218. Poznań: Wydawnictwo Rys kaj Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.
- Trubetzkoy, NikolaJ S. 1939. *Grundzüge der Phonologie*. (Travaux du Cercle linguistique de Prague, 7.) Leipzig: Harrassowitz.
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1905. *Fundamento de Esperanto*. Paris: Hachette.
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1929. *Originala Verkaro de L. L. Zamenhof*, redaktis Johannes Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1962. *Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto*. Sesa Eldono, redaktis Gaston Waringhien. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj.

## Pri la aŭtoro

Otto Prytz naskiĝis en norda Norvegujo 1943, eklernis Esperanton en 1955 en porblindula lernejo, studis hispanan lingvon, rusan lingvon kaj ĝeneralan lingvistikon, kaj laboris kiel lekciisto pri hispana lingvo en la Universitato de Oslo inter 1978 kaj 2005. Inter 2004 kaj 2022, li estis membro de la Akademio de Esperanto.

Retadreso: [pilotto@online.no](mailto:pilotto@online.no)



## About the author

Otto Prytz was born in northern Norway 1943, started learning Esperanto 1955 at a school for the blind, studied Spanish, Russian, and General Linguistics, and worked as a lecturer in Spanish at the University of Oslo from 1978 to 2005. From 2004 to 2022, he was a member of the Academy of Esperanto.

## Sobre el autor

Otto Prytz nació al norte de Noruega 1943, aprendió esperanto 1955 en una escuela para ciegos, estudió lengua española, lengua rusa y lingüística general, y trabajó como profesor de español en la Universidad de Oslo de 1978 a 2005. De 2004 a 2022, fue miembro de la Academia de Esperanto.

### Is Esperanto, as described on its own premises, a sexist language?

**Abstract:** The article starts with examples showing the non-universality of grammatical categories, a non-universality often hidden by the fact that the grammar of a prestigious language, e.g. Latin in Europe, has served as a model for describing other languages. A language system should be described on its own premises. Oppositions constitute an important feature of language subsystems. In the opposition of adjectives denoting dimension, the marked member, the one denoting small dimension, refers to one “pole” of the range, whereas the unmarked member may refer to the other pole or to the whole range of the opposition. Other oppositions in Esperanto are those of number, of case and of person/thing. In 3rd-person pronouns, the last-mentioned exists only in singular, and its marked member seems to be “person”, which, in turn, contains an opposition of sex, whose marked member is female. That means that the unmarked member, “li” (he), “frato” (brother), “filo” (son), etc., may refer either to the male pole or to the whole range of the opposition. In conclusion, sexism is an attitude, not a property of a language: a language with features which might reflect attitudes of erstwhile speakers, is perfectly usable also for opponents of sexual oppression.

**Keywords:** Esperanto; Grammatical categories; Language oppositions; Polarity / non-polarity; Sex.

### El Esperanto, descrito a sus propias premisas, ¿es una lengua sexista?

**Resumen:** El artículo empieza con ejemplos de la no-universalidad de categorías gramaticales, no-universalidad a menudo oculta porque una lengua prestigiosa, p. ej. el latín en Europa, haya servido como modelo

para describir otras lenguas. Un sistema lingüístico debería describirse a sus propias premisas. Las oposiciones constituyen un rasgo importante de subsistemas lingüísticos. En la oposición de adjetivos de dimensión, el miembro marcado, el de dimensión pequeña, se refiere a un “polo” de la gama, mientras que el miembro no marcado puede referirse bien al otro polo, bien a todo el campo de la oposición. Otras oposiciones del esperanto son las de número, de caso y de persona/cosa. En los pronombres de tercera persona, ésta última existe sólo en singular, siendo, al parecer, su miembro marcado “persona”, que, a su vez, contiene una oposición de sexo, cuyo miembro marcado es “femenino”. Eso significa que el miembro no marcado, “li” (él), “frato” (hermano), “filo” (hijo) etc., puede referirse al polo masculino o a todo el campo de la oposición de sexo. En conclusión, el sexismo es una actitud, no una cualidad lingüística: una lengua, aun reflejando actitudes de hablantes de antaño, es perfectamente utilizable también para los militantes contra la opresión sexual.

**Palabras-clave:** Categorías gramaticales; Esperanto; Oposiciones lingüísticas; Polaridad / no-polaridad; Sexo.